

[noto] fonto: "La Sukhavativjuho", JEL, 1932
"La Japana Budhano" n-ro 377, 2015

LA SUKHAVATIVJUHO

**Budha sankta skribo pri la Mondo de Feliĉo
kreita de la Tathagato Amitajus**

**El la sanskrita originalo esperantigis
Kiuiĉi Nohara**

Antaŭparolo de l' Tradukinto

Sukhavati estas la nomo de la Mondo de Feliĉo, kreita kaj estrata de Tathagato Amitajus. Ĝi estas en la okcidento tre malproksima - tiom malproksima, estas dirite, ke inter ĝi kaj nia homa mondo kuŝas centmil koti (Sanskrita numero egala al dek milionoj) da Budhaj regnoj. La genezo de tiu mondo estas tiom antikva, ke de post tiam jam forpasis dek kalpoj (Sanskrita unuo de tempo, egala al ĉ. jarbiliono), sed ĝis nun Tathagato Amitajus, la eternulo, ankoraŭ regas, kaj regos por ĉiam. Se homo en ĉi tiu mondo kredas en Li, kaj memoras Lian nomon, li nepre renaskiĝos postmorte en Lia regno, kie estas nenia doloro, sed estas nur feliĉo. — Pri ĉi tiu dogmo, la Budho faris predikon iam dufoje, antaŭ grandega aŭskultantaro - unuafoje tre detale en la monto Gridhrakuta, apud la urbo Raĝagriha; duafoje nur resume en la ĝardeno Anathapindada, en la lando Ŝravasti.

La Budhanaj sanktaj skribaĵoj estas klasigitaj en "tri kolektojn" (Tripitaka en Sanskrito):

- 1 Sutra-pitaka, aŭ kolekto de l' libroj, enhavantaj la predikon de la Budho;
- 2 Vinaja-pitaka, aŭ kolekto de l' libroj, enhavantaj la religian ordonon de la Budho;
- 3 Abhidharma-pitaka, aŭ kolekto de l' libroj enhavantaj la diskutadon faritan de eminentaj Budhanoj.

La tuta kolekto estas terure ampleksa, tiom, ke en la traduko ĉinlingva (kiu estas nuntempe pli kompleta ol la Sanskrita aŭ Palia originalo), ni havas pli ol kvin mil libroj.

Por la dufojaj predikoj de la Budho pri Sukhavati kaj ĝia kreinto, ekzistas du Sutroj (tiel estas nomata ĉiu libro, kiu apartenas al Sutro-pitaka), kun sama nomo Sukhavativjuho. Ĉi tiu libreto, kiun mi tradukis kaj nun prezentas al Esperantista publiko, kiel ekzempleron de l' orienta klasikaĵo, estas la malpligranda Sukhavativjuho, kiu estas skribo de l' prediko en la lando Ŝravasti.

La ĉinlingva malpligranda Sukhavativjuho, tradukita de la Tripitakulo (tiel estas nomata la eminenta Budhano-lerninto, kiu ellernis plejparton de la Tripitaka) Kumaraĝiva (339-413), estas vaste konata per la nomo Amida Kjo (Amito Ĉing). Manuskripto de ĝia Sanskrita originalo, konservita en unu malnova Budha templo en Japanujo, estis eldonita de Max Müller kaj lia disĉiplo Bunyiu Nanjio, unuafoje en 1880, kaj duafoje kune kun la pligranda Sukhavativjuho en 1883. La originala teksto kaj la ĉina traduko iomete diferencas inter si, sed ĉi tiu estas jam de longe alkiutimiĝinta al niaj oreloj (kvankam en japanaj Budhanaj preĝejoj, oni legadas la ĉinlingvan sanktan skribaĵon en la nekomprenebla "boojomi"-dialekto, kiu nur signifas: bonza legado); tial

por ke legantoj mem ilin komparu, oni enpresis la ĉinlingvan tekston ĉe l' fino de la volumo.

Ĉofu, en Aprilo 1932

K. Nohara

Adorkliniĝu antaŭ la Ĉioscianto!

Tiel de mi estas aŭdite:

Iam la Adorato estis en Ŝravastilando, en la Arbareto de Ĝeta, en la Ĝardeno de Anathapindada¹, kune kun grandnombra Bhikshuaro² — mil ducent kvindek Bhikshuoj, grandaj disĉiploj, Arhatoj³ kun transcendaj scipovoj⁴, el kiuj la plej distingitaj estis: Estimata Ŝariputra, Granda Maŭdgalajana, Granda Kaŝjapa, Granda Kapphina, Granda Katjajana, Granda Kaŭsthila, Revata, Ŝuddhipanthaka, Nanda, Ananda, Rahula, Gavampati, Bharadhvaĝa, Kalodajin, Vakkula, Aniruddha k.t.p. Kaj krom ĉi tiuj grandnombraj grandaj disĉiploj, estis ankaŭ tie grandnombraj Bodhisatvoj-Mahasatvoj⁵, el kiuj la plej distingitaj estis: Manĝuŝri la Juna Princido, Bodhisatvo Aĝita, Bodhisatvo Gandhahastin, Bodhisatvo Nitjoudjukta, Bodhisatvo Aniksiptadhura k.t.p. Kaj krom ĉi tiuj grandnombraj Bodhisatvoj-Mahasatvoj, estis ankaŭ tie Ŝakro, la reĝo de dioj, Brahmano, la estro de la mondo Saha. Kaj krom ĉi tiuj estis ankaŭ tie multaj centmil miliardoj da diidoj.

Tiam la Adorato alparolante al la pliaĝulo Ŝariputra diris: "Ŝariputra, de tie ĉi okcidenten transpasinte tra centmil dekmilionoj da Budhaj regnoj, troviĝas unu Budha regno, la mondo Sukhavati (mondo de feliĉo). Tie Tathagato⁶-Arhato-Vervekiĝinto nomata Amitajus (supermezura vivo) nun loĝas, sin subtenas, travivadas, kaj instruadas la Leĝon. Nu, Ŝariputra, kion vi pensas pro kio tiu mondo estas nomata Sukhavati?

¹ **Anathapindada.** La vorto signifas: Tiu kiu donadas ĉiutagan panon al senpaculoj; alnomo donata al la bonfaranta riĉegulo Sudatta. Ĥinlingve 給孤独

² **Bhikshu'** Almozulo, samtempe Budhana monaĥo aŭ bonzo, ĉar ĉi tiu devas vivadi almoze. Ĥinlingve 比丘、苾芻 Elparolu sh laŭlitere, sed ne kiel ŝ.

³ **Arhat'** Titolo al la sanktulo kiu havas meriton aŭ indecon ricevi sanktan dediĉaĵon. Ĥinlingve 阿羅漢、應供

⁴ **transcendaj scipovoj** (abijñā) Da tiel nomataj scipovoj aŭ fakultoj, Budhana sanktulo estas dirata posedi kvin: 1 fari miraklon, 2 travidi ĉion, aŭ posedi diecajn okulojn, 3 aŭdi kaj kompreni lingvon de nehoma kreitaĵo, aŭ posedi diecajn orelojn, 4 legi personon de alia homo, 5 scii sian antaŭnaskan ekzistadon.

⁵ **Bodhisatvo** (Bodhisattva) Sanktulo la plej proksima al Budheco; bodhi (vekiĝeco, intelekto) + sattva (estaĵo). **Mahasatvo** Alia titolo donata al la sama sanktulo; Maha = granda. Ĥinlingve 菩薩、摩訶薩

⁶ **Tathagato** (Tathagata) Unu el la titoloj donataj al ĉiu Budho; la vorto signifas "tiel konduiti" t.e tiu kiu kondutas tiel kiel la Vero. (如来)

Vere mi diras al vi, Ŝariputra, tie en la mondo Sukhavati, ne ekzistas por la estaĵoj ia doloro ĉu korpa ĉu spirita, sed nur ekzistas sennombaj fontoj de feliĉo; pro tio tiu mondo estas nomata Sukhavati.

"Kaj, Ŝariputra, la Mondo Sukhavati estas ornamita per sep balustradoj, sep vicoj da palmirarboj⁷, kaj pendantaj tintilretoj, kaj ĉirkaŭata de vidinde belegaj kvarspecaj gemoj: oro, arĝento, berilo, kaj kristalo. Tiamaniere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, en la Mondo Sukhavati, troviĝas lotuslagoj konstruitaj el sepspecaj gemoj: oro, arĝento, berilo, kristalo, ruĝa perlo, diamanto, kaj koralo la sepa gemo. Akvo kun ok virtoj⁸ ilin plenigas ĝis vadejo, tiel ke eĉ korvo povas eltrinki tie. La fundo estas sternita per ora sablo, kaj ĉe la kvar flankoj ĉirkaŭ la lagoj troviĝas kvar ŝtupoj ornamitaj per la kvarspecaj gemoj: oro, arĝento, berilo, kaj kristalo. Kaj sur la ĉirkaŭbordoj de la lotuslagoj, kreskadas gemecaj arboj ornamitaj per la vidinde belegaj sepspecaj gemoj: oro, arĝento, berilo, kristalo, ruĝa perlo, diamanto, kaj koralo la sepa gemo. Kaj en ĉi tiuj lotuslagoj kreskadas diversspecaj lotus-floroj: blujaj, blukoloraj, blubrilaj, bluaspektaj; flavaj, flavkoloraj, flavbrilaj, flavaspektaj; ruĝaj, ruĝkoloraj, ruĝbrilaj, ruĝaspektaj; blankaj, blankkoloraj, blankbrilaj, blankaspektaj; miksaj, mikskoloraj, miksbrilaj, miksaspektaj — tiom larĝegaj kiom vagonradoj. Tiamaniere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, en tiu Budha regno, estas ĉiam surludataj ĉielaj muzikinstrumentoj, kaj tie la tero estas ŝateginde orkolora. Kaj en tiu Budha regno, ĉiunokte tri fojojn, ĉiutage tri fojojn, pluvadas pluvo da ĉielaj Mandaravaj floroj. Ĉiuj tie naskiĝintaj estaĵoj antaŭtagmanĝe en aliajn mondojn irante adoras la centmil dekmilionajn Budhojn, kaj al ĉiu Tathagato dediĉante pluvon da centmil dekmilionoj da floroj, revenas en sian mondon por fari ĉiutagan servon. Tiamaniere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, en tiu Budha regno, sin trovas flamengoj, Kalavinkoj, skolopoj, kaj pavoj. Ĉiunokte tri fojojn, ĉiutage tri fojojn, ĉi tiuj birdoj faras koncerton, ĉiu kantante en sia propra lingvo; kaj el ilia kantado aŭdiĝas la voĉo de la kvin virtoj⁹, la kvin

⁷ **palmirarbo** Sanskrite Tāla; anglolingve palmyra; ĥinlingve 多羅

⁸ **ok virtoj** (akvo kun) Tiel nomata estas la akvo kiu havas jenajn ecojn: 1 dolĉeta, 2 malvarma, 3 mola, 4 malpeza, 5 pura, 6 senodora, 7 ne difektanta gorĝon kiam oni ĝin trinkas, 8 ne difektanta la inteston post kiam oni ĝin trinkas. (八功德水)

⁹ **kvin virtoj** 1 kredado, 2 penado, 3 rememorado, 4 koncentrado, 5 saĝeco aŭ antaŭvido. Ĥinlingve 五根

povoj¹⁰, kaj la sep eroj de vekiĝeco¹¹. Ĉe la homo aŭdinta tiun voĉon, naskiĝas pripenso pri Budho, naskiĝas pripenso pri Leĝo, naskiĝas pripenso pri Eklezio. Kaj, Ŝariputra, ĉu vi do pensas ke tiuj estaĵoj estas bestaj kreitaĵoj¹² (t.e. kondaminito)? Ne, nenial faru tian vidon. Kial? En tiu Budha regno, Ŝariputra, koncerne al Infero, besto, aŭ la regno de Jama¹³, eĉ la nomo ne ekzistas. Sed tiu birdaro estas kreita de la Tathagato Amitajus, por ke ili kantadu en la voĉo de la Leĝo. Tiamaniere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, en tiu Budha regno, kiam la vicoj da palmirarboj kaj la pendantaj tintilretoj estas movetataj de venteto, tiam bela agrabla sono elsonas. Nun Ŝariputra, supozu, ke centmil dekmilionoj da ĉielaj muzikinstrumentoj estas ludataj de honorindaj homoj, tiam kompreneble bela agrabla sono elsonas; tiel same, Ŝariputra, kiam la vicoj da palmirarboj kaj la pendantaj tintilretoj estas movetataj de venteto, tiam bela agrabla sono elsonas. Kaj kiam la homoj aŭdas tiun sonon, tiam rememoro pri Budho aperas en ili, rememoro pri Leĝo aperas en ili, rememoro pri Eklezio aperas en ili. Tiamaniere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kion vi pensas, Ŝariputra, pro kio tiu Tathagato estas nomata Amitajus? Vere mi diras al vi denove, Ŝariputra, la vivodaŭro (ajus) de tiu Tathagato kaj tieaj homoj estas supermezuraj (amita); pro tio tiu Tathagato estas nomata Amitajus. Kaj ĝis nun,

¹⁰ **kvin povoj** Efektivigaj povoj de la kvin virtoj. Ĥinlingve 五力

¹¹ **sep eroj de la vekiĝeco** 1 rememorado, 2 distingo aŭ elekto de la Leĝoj, 3 penado, 4 ĝojeco, 5 trankvileco, 6 koncentrado, 7 indiferenteco. Ĥinlingve 七覺支、七菩提分

¹² **besta kreitaĵo** Sanskrite tirjagjonigata, Ĥinlingve 傍生惡趣. Ĉe la Budhanoj, ĉi tiu vorto samtempe signifas kondamniton aŭ malbeniton (almenaŭ kunrememorigas). Jen kialo. Laŭ Budhismo, tiuj animoj kiuj ankoraŭ ne estas redemptitaj je la pekado de siaj antaŭnaskaj virtoj devas esti alligataj al bestaj korpoj por ĉiam rondiradi kaj rondiradi en la metempsikoza vojo. Kompreneble tiaj estaĵoj ne konformiĝas al la Lando de Feliĉo.

¹³ **Jama** La dio-punanto de mortintoj. Ĥinlingve 琰魔、閻魔

Ŝariputra, dek Kalpoj¹⁴ jam forpasis, depost tiam, kiam la Tathagato proprigis al si la Plejsuperan Veran Vekiĝecon (t.e. Budhecon).

"Kion vi pensas, Ŝariputra, pro kio tiu Tathagato estas ankaŭ nomata Amitabha (supermezura lumo)? Vere mi diras al vi denove, Ŝariputra, la lumo (abha) de tiu Tathagato senbare trairas tra ĉiuj Budhaj regnoj; pro tio tiu Tathagato estas nomata Amitabha.

"Kaj, Ŝariputra, kun tiu Tathagato estas aro da sennombraj disĉiploj, puraj Arhatoj ne facile mezureblaj. Tiamaiere, Ŝariputra, per la meritoplenaj ornamaĵoj de Budha regno, solenigata estas tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, la estaĵoj naskiĝintaj en la Budha regiono de la Tathagato Amitajus, estas Bodhisatvoj puraj, nepostenirontaj destinitaj fariĝi Budhoj post unu renaskiĝo, kies nombro, Ŝariputra, ne estas facile kalkulebla, tiel ke oni povas ĝin esprimi nur per la vorto nemezurebla, aŭ nekalkulebla, Vere mi diras al vi denove, Ŝariputra, estaĵoj nepre devas sopire meditadi pri la Budha regno. Pro kia kaŭzo? Pro tio, ke tie oni kunvivadas kun tiaj bonegaj homoj. Per helpo de malgranda bonradiko¹⁵, tamen, Ŝariputra, estaĵoj ne povos naskiĝi en la Budha regno de la Tathagato Amitajus. Sed,

¹⁴ **Kalpo** (Kalpa, 劫波, 劫). Hinda kosmologia jaro, aŭ granda unuo de la tempo; jen unu el kelkaj difinoj, kiuj estas iom malsamaj unu kun alia. La vivodaŭro de homo estas ŝanĝema regule laŭperiode. Iam ĝi estis 84,000 jaroj, kaj poste fariĝas ĉiucentjare plimallonga po unu jaro, kaj fine atingos sian malsuprolimon t.e. 10 jaroj. Tiam ĝi fariĝos plilonga ĉiucentjare po unu jaro, kaj fine atingos denove la suprolimon t.e. 84,000 jaroj. Ĉi tiu daŭro de unu ciklo estas nomata "malgranda Kalpo", kaj tiu de 20 cikloj "meza Kalpo". Kvar sindsekvantaj mezaj Kalpoj, el kiuj la unua estas nomata "Kreiĝa", la dua "Restada", la tria "Detruiga", kaj la lasta "Neniiga", faras unu Kalpon aŭ pli precize unu grandan Kalpon (Mahakalpa). Laŭ ĉi tiu difino la tradukinto ĝin kalkuladis kiel jene:

Malgranda Kalpo = $(84,000-10) \times 100 \times 2 = 16,798,000$ jaroj

Meza Kalpo = $16,797,000 \text{ jaroj} \times 20 = 335,969,000$ jaroj

Granda Kalpo = $335,969,000 \times 4 = 1,343,840,000$ jaroj

Pormalklerula difino de Kalpo, donata de Budho mem: "Kalpo estas longa, longega tempo. Supozu ie kuŝas roko kun grandeco de 100^3 joĝanoj (unu joĝano = 9 mejloj proksimume). Unu anĝelo tien venadas ĉiucentjare unufojon, kaj ekfrotas la rokon per la maniko de la robo silka. La tempo forpasas kaj forpasas, kaj la homo agadas regule por ĉiam. La roko frotata forskrapiĝas iomete post iomete, kaj finfine estas tute malestigita. Ĝis tiam kompreneble longa, longega tempo forpasis, sed la daŭro de Kalpo ankoraŭ ne finiĝas." La komparo estas farata lertege, sed multe trograndige, mi opinias.

¹⁵ **bonradiko** La vorto signifas nenion pli ol "bonfaro" aŭ "bona konduto". Por konservi kiel eble plej bone la ideon de la originalo (Sanskrite Kuŝalamula, Ĥinlingve 善根), mi tradukis laŭvorte per ĉi tiu kunmetita vorto. Efektive, laŭ Budhismo, bonfaro en nia estanta vivo estas "radiko", el kiu ekĝermas bona rezultato en la venonta aŭ postmorta vivo.

Ŝariputra, ĉiu filo aŭ filino de bona familio aŭdu la nomon de la adorata Tathagato Amitajus, kaj ĝin aŭdinte pripensadu, pripensadu kun nedisiĝinta konscio en la daŭro de unu nokto, aŭ du noktoj, aŭ tri noktoj, aŭ kvar noktoj, aŭ kvin noktoj aŭ ses noktoj, aŭ sep noktoj; tiam, en la momento, kiam tiu filo aŭ filino de bona familio estas mortonta, la Tathagato Amitajus, ĉirkaŭata de aro da disĉiploj kaj sekvata de procesio de Bodhisatvoj, aperos antaŭ la mortontoj, kaj ĉi tiuj mortos sen kormaltrankviliĝo, kaj postmorte renaskiĝos en la Budha regno de tiu sama Tathagato Amitajus, la mondo Sukhavati. Tial, Ŝariputra, rimarkinte ĉi tiun veron, mi riverence diras tiel: Filo aŭ filino de bona familio nepre devas sopire meditadi, kun tuta koro, pri tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, kiel mi nun ĉi tie laŭde proklamas pri tiu Budha regno, tiel same, Ŝariputra, en la Oriento, Tathagato Akŝobhja, Tathagato Merudhvaĝa, Tathagato Mahameru, Tathagato Meruprabhasa, Tathagato Manĝudhavaĝa, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Oriento, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sektion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

"Kaj tiel same en la Sudo, Tathagato Ĉandrasurjapradipa, Tathagato Jasabprabha, Tathagato Maharĉiskandha, Tathagato Merupradipa, Tathagato Anantavirja, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Sudo, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sektion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

Kaj tiel same en la Okcidento, Tathagato Amitajus, Tathagato Amitadhvaĝa, Tathagato Mahaprabha, Tathagato Maharatnaketu, Tathagato Ŝuddharŝmiprabha, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Okcidento, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sektion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

"Kaj tiel same en la Nordo, Tathagato Maharĉiskandha, Tathagato Vaiŝvanaranirghosha, Tathagato Dumdubhisvaranirghosha, Tathagato Dushpradharsha, Tathagato Aditjasambhava, Tathagato Ĝaleniprabha, Tathagato Prabhakara, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Nordo, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sektion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

"Kaj tiel same en la Malsupro, Tathagato Simha, Tathagato Jaŝas, Tathagato

Jaśahprabhasa, Tathagato Dharma, Tathagato Dharmadhara, Tathagato Dharmadhvaĝa, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Malsupro, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sekcion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

"Kaj tiel same en la Supro, Tathagato Brahmagoŝa, Tathagato Nakŝatraraĝa, Tathagato Indraketuĝaraĝa, Tathagato Gandhottama, Tathagato Gandhaprabhasa, Tathagato Maharĉiskandha, Tathagato Ratnakusumasampushpitagatra, Tathagato Salendrararaĝa, Tathagato Ratnotpalaŝri, Tathagato Sarvarthadarŝa, Tathagato Sumerkalpa, kaj, Ŝariputra, ceteraj adorataj Budhoj en la Supro, grandnombraj egale al la sableroj ĉe la rivero Ganga, surkovrante siajn proprajn Budhajn regnojn per la langoj, deklaras: 'Akceptu vi ĉi tiun sekcion de la Leĝo, nomatan Favoro de ĉiuj Budhoj, kiu laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budha regno.'

"Kaj nun, Ŝariputra, kion vi pensas, pro kio ĉi tiu sekcio de la Leĝo estas nomata Favoro de ĉiuj Budhoj? Ĉiu filo aŭ filino de bona familio kiu aŭdis la nomon de ĉi tiu sekcio de la Leĝo, kaj firme tenadas (en memoro) la nomojn de la Budhoj, ricevos favoron de ĉiuj Budhoj, kaj neniam posteniros de la Plejsupera Vera Vekiĝeco. Tial, Ŝariputra, kedu, akceptu sendubeme (tion kion instruas) mi kaj la adorataj Budhoj. Ĉiu filo aŭ filino de bona familio, Ŝariputra, kiu faros aŭ faris aŭ faras koran sopirmeditadon por la Budha regno de la Tathagato Amitajus, nepre estos aŭ estis aŭ estas naskiĝonta en tiu Budha regno, neniam postenironte. Tial, Ŝariputra, ĉiuj filoj aŭ filinoj de bonaj familioj kiuj kredas, devas fari sopirmeditadon por tiu Budha regno.

"Kaj, Ŝariputra, kiel mi nun ĉi tie laŭde proklamas pri la neimagebla merito de la Budhoj, tiel ankaŭ la adorataj Budhoj laŭde proklamas pri mia neimagebla merito, dirante: 'Malfacilegaĵo estas farita de la adorata Ŝakjamuni la reĝo de la gento Ŝakja, kiu al si propriginte la Plejsuperan Veran Vekiĝecon en la mondo Saha, instruadis la Leĝon malfacile akceptotan al la tuta mondo, sub la regado de malpureco de Kalpo, malpureco de estaĵaro, malpureco de vido, malpureco de vivo, kaj malpureco de pasioj.' Efektive, Ŝariputra, estis por mi plej malfacilege proprigi al mi la Plejsuperan Veran Vervekiĝecon en la mondo Saha, kaj instruadi la Leĝon malfacile akceptotan al la tuta mondo, sub la regado de malpureco de Kalpo, malpureco de estaĵaro, malpureco de vido, malpureco

de vivo, kaj malpureco de pasioj¹⁶."

Tiel paroladis la Adorato kun ĝojo. Ŝariputra la plejaĝulo, Bhikshuoj, Bodhisatvoj, kaj la tuta mondo kun dioj, homoj, Asuroj (demonoj), kaj Gandharvoj (genioj), dankeme akceptis la paroladon de la Adorato.

Grandveturila¹⁷ Sankta Skribo

nomata

Sukhavativjuha

[Mondo de Feliĉo en Sia Plenornamo]¹⁸

¹⁶ Laŭ Budhismo, la nuna mondo estas regata de tiel nomata Kvin Malpurecoj (五濁), nome, 1 malpureco de l' Kalpo (劫濁), t.e. la Kalpo aŭ tempo mem estas en malpura stato, kaj pro tio ĉio estas malbona; 2 malpureco de l' estaĵaro (衆生濁), t.e. ĉiuj estaĵoj havas inklinon fari malbonaĵojn; 3 malpureco de vido (見濁), t.e. homo havas inklinon vidi aŭ pensi malbone; 4 malpureco de vivo (命濁), t.e. nia vivodaŭro estas tre mallonga, kaj pro tio, bedaŭrinde ni ne havas sufiĉe da tempo por fari bonaĵojn; 5 malpureco de pasioj (煩惱濁), t.e. pasioj alportas al ni ĉion malbonan.

¹⁷ **Veturilo** Tiel estas nomata la instruo aŭ evangelio de Budho, ĉar ĝi alportas homon en la idealan staton de Nirvano (kompleta estingiĝo aŭ liberiĝo). Oni klarigas ĝin en du kategorioj: Grandveturilo kaj Malgrandveturilo. La unua estas tiu parto de Budhismo, kiu estas pli evoluinta kaj altruisma, havante sian fundamenton en la plej profunda filozofio, dum la dua estas primitiva, kaj celas nur memkulturadon. Estas dirite, Bodhisatvoj veturas per la granda veturilo, kaj Ŝravakoj kaj Pratiekabudhoj per la malgranda veturilo.

¹⁸ Hindoj kutime metas la titolon de libro ĉe l' fino de teksto